

La Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 577 1974.10.30 & 11.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En 1972 ni jam raportis pri la Someraj Universitataj Kursoj, kiuj disvolviĝis dum kvar semajnoj en la Universitato de Lieĝo. La pasintan aŭguston dum tri semajnoj disvolviĝis dua kurssesio de SUK. Ni ĉeestis tiujn kursojn dum la du unuaj semajnoj. Kiel antaŭ du jaroj ni multe ŝatis tiun aranĝon, kiu permesas ferii en stud-atmosfero. Tiuj kontaktoj kun profesoroj venintaj el diversaj kontinentoj kaj kun aliaj studemuloj estas ege riĉigaj multrilate. Dum kelkaj tagoj oni povas enprofundiĝi en la propran aŭ en novan fakojn, oni povas interŝanĝi vidpunktojn kun aliaj serĉantoj, oni povas interkonatiĝi en etoso, kiu vekas diskutojn.

A.- Ĉijare ni povis elekti inter tri programoj. Inter la proponitaj kursoj ni menciis unue la enkondukajn kursojn pri biologio, kiujn gvidis doktoro Støp-Bowitz veninta el Norvegio, due la kursojn pri kemio kaj biokemio, kiujn gvidis doktoro Kawamura veninta el Japanio, kaj pri algoj de doktoro Lewin, Usono. Kaj trie la lekciojn pri psikologvistiko de sinjoro Duc Goninaz el Francio kaj doktoro Brent el Kanado.

Cl.- La organiza komitato ne estis sufiĉe forta por povi ĉion antaŭ-aranĝi. El tio gravaj mankoj en la informado de la esperantistaro. Pro tio la kursanaro reduktiĝis al malgranda nombro da personoj, inter kiuj vere malabundis la studentoj. Kiel por la unua kurs-sesio, UEA kaj aliaj gravaj esperanto-organizaĵoj ne aktive subtenis tiun provon ekfunkciigi ferian esperanto-universitaton. Tiun negativan sintenon de UEA ni ne povas kompreni. Por la esperanto-klerularo someraj universitataj kursoj certe respondas al bezono. Se povos okazi tria kurssesio, ni esperas, ke tiam UEA kaj la aliaj esperanto-organizaĵoj pli favore kunlaboros por diskonigi tiun aranĝon.

A.- Pluraj kritikoj, kiujn ni esprimis antaŭ du jaroj, daŭre valoras. Al la profesoroj, kiuj venis el Britio, Francio, Japanio, Kanado, Norvegio kaj Usono, bedaŭrinde mankis sufiĉa nombro da preleg-horoj por povi iom funde pritrakti la antaŭviditajn temojn. Tio tro limigita nombro da preleg-horoj por ĉiu kurso donas al la tuto aspekton de ludo. Verŝajne unusemajnaj kursoj kun po nur maksimume deko da lekcioj ne povas sufiĉi al universitata instruado. La profesoroj kaj la instruatoj sentas la bezonon de praktikaj ekzercoj. Ofte la instruantoj alportis materialon, kiun la kursanoj eĉ ne havis la tempon ekzameni. Estas malŝparo de eblecoj kaj de fortoj.

Cl.- Tiuj kursoj altiris tre varian publikon. Specialistoj ilin sekvis por intimiĝi kun la esperanto-nomenklatureo propra al la koncerna fako. Studemuloj venis por lerni ion novan. Esperanto-balbutantoj elektis tiujn kursojn por intimiĝi kun esperanto. Kaj ferieumuloj miris, ke en SUK ne estas eksterkursa programo. Ili ne komprenis, ke kursojn oni povas profite sekvi, nur se dum la vesperoj kaj la liberaj momentoj oni prenas la tempon asimili la instruŝtofon. Prelegi antaŭ tiom varia publiko ne estis facila tasko por la profesoroj.

A.- La unuversitata bieno Sart Tilman, kie disvolviĝis la tuta instruado kaj kie ĉiuj loĝis en komfortaj studentaj unulitaj ĉambroj, estas tre agrabla kunvenejo. La prelegejoj, la restoracio kaj la loĝejoj estas dissemataj sur vastega teritorio duone arbara kaj duone herbeja. Je kvaronhora busveturo troviĝas la urbo Lieĝo.

Cl.- Inter la plej pozitivaj rezultoj de tiuj Someraj Universitataj Kursoj ni menciuj kaj la vigligon de la sciencaj kontaktoj kaj ĉefe la eldonadon de kurskajeroj. Tiuj ofte dikaj multobligitaj kursoj iom post iom formas fakliteraturan fundamenton, kiu ĝis nun mankis al la specialistoj. Iliaj aŭtoroj devis ne nur reverki sub esperanta vesto la instruojn, kiujn ili ĝenerale donas en grava etna lingvo. Por povi tion fari, ili devis forĝi la necesan fakan vortaron. Tiu forĝado ne restis abstrakta cerbumado. La kreitaj neologismoj nakiĝis pro vera neceso. Dum la kursgvidado la profesoroj kaj instruatoj povis kune diskuti pri la taŭgeco aŭ netaŭgeco de la proponitaj vortoj. Ankaŭ la legantoj de la kursoj povos kritiki tiujn vortojn. Kiel tio okazis por la aliaj neologismoj, la nekonvenajn terminojn anstataŭos pli taŭgaj radikoj. Tiel la fakaj lingvaĵoj iom post iom fariĝas pli maturaj por povi baldaŭ ekservi al kreiva literaturo.

A.- Por doni al vi ekzaktan ideon pri la konstrua rolo de SUK, ni donos al vi liston de la kurskajeroj, kiuj aperis dum la dua kurssesio. Kiel vi konstatos, temas pri enkondukaj kaj pri fakaj lernolibroj.

Cl.- Doktoro Kawamura, profesoro pri biokemio en la fakultato de agrikulturo de la Universitato de Kagawa, redaktis 5 kursojn pri kemio kaj biokemio. Jen iliaj titoloj : *Fundamentaj konceptoj en kemio. Informado kaj dokumentado pri kemio. Enkonduko en organikan kaj biologian kemion. Kemio kaj biokemio de karbonhidratoj. Kemio de manĝaĵoj, ĉefe novaj proteinoj.*

A.- Alia dinamisma aŭtoro estas doktoro Støp-Bowitz, profesoro pri bestkuracado kaj biologio en la Universitato de Oslo. Li redaktis 3 kursojn enkondukajn pri biologio. Jen iliaj titoloj : *Enkonduko en ĝeneralan biologion. Elementa ekologio. Segmentitaj animalaj grupoj.*

Cl.- Ni ankoraŭ menciuj tri aliajn kursojn. De Michel Duc Goninaz : *Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko.* De M. Flint : *Porfirinoj aŭ biokemio de vivnecesaj pigmentoj ; ĉefe tiu de la ruĝa ĉelo de la sango.* De E. Balech : *Planktono kaj mara produktado.*

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!